


ORIENTA STELO

Majo 2014



Orienta Esperantista Federacio
Originale fondita en aprilo 1932

Eastern Esperanto Federation
Originally founded in April 1932

Kontaktdetaloj

Roy Threadgold	Prezidanto	01371850481
Roy Simmons	Sekretario	01473461346
Barrie Murphy	Kasisto	01702472193
Mark Drake	Komitatano	02085188094

roy@boydellsdairy.co.uk
rokeby@globalnet.co.uk
celiaandbarrie@tiscali.co.uk
marko.drejko@gmail.com

Tiuj kiuj ricevas OS rete, ricevas ĝin pli frue kun koloraj bildoj, kaj samtempe la Federacio ŝparas la poŝtkoston. Ĉiuj gajnas! Nur bezoniĝas informi al Roy T. pri via retadreso.

La Federacia Jarkunveno

Sabaton la 29an de marto kunvenis en Church House, Braintree dek du samideanoj de la Orienta Esperantista Federacio

La tago estis sufiĉe sunbrila, kaj post la kutima 'lingva kliniko', grupanoj promenis tra la urbocentro por malkovri la teksaĵa historio de la urbo.

Ni spektis kelkajn el la belaj konstruaĵoj kiujn la firmao Courtauld donis al la urbo (fontano, urbodomo, flegistina hejmo, lernejo ktp.)

kaj ankaŭ la fabriko kie la firmao Warners teksis la kronadaj silkroboj por ĉiuj monarkoj en la 20a jarcento. Ni vizitis la lokan muzeon kie ni povis vidi ekzemplerojn de tiuj teksaĵoj.



La ĉefa parto de la kunveno estis ilustrita prelego de Kimie Markarian pri ŝia lastatempa vizito al Sudafriko.

En la regiono apud kaj inkluzive de Cape Town, Kimie vizitis plurajn lernejojn por montri la uzon de la japana kalkulilo 'sorobano.' Per lumbildoj ŝi povis montri al ni la loĝantojn kiujn ŝi renkontis, kaj la diversajn aspektojn de la vivo en tiu lando.


Pri la jarkunsido mem, Roy Threadgold volis ekŝiĝi kiel prezidanto sed oni persvadis lin daŭrigi en la posteno unu jaron pli, kaj Roy Simmons denove oficistiĝis, ĉi-foje kiel sekretario, post la foriro de Ben Gosling. Barrie Murphy kaj Mark Drake estas reelektitaj respective kiel kasisto kaj komitatano.

La venonta kunveno de la federacio okazos en Ipswich la 24an de majo.



LA FEDERACIO
 kunvenos ĉe Whitton Baptist Church,
 Highfield Road, Ipswich, IP1 6DH
 sabaton la 24an de majo
 inter 11.00 atm kaj 5.00 pm.
 Dum la kunveno estos promeno
 laŭ la rivero Gipping.
 Tagmono (inkluzive tagmanĝon) £ 5
 Se iu bezonas veturigon de la
 stacidomo en Ipswich al la kunvenejo,
 bonvolu kontakti nian sekretario.

THE NEXT FEDERATION MEETING
 is at Whitton Baptist Church
 Highfield Road, Ipswich, IP1 6DH
 Saturday 24th May
 11.00 am to 5.00 pm
 The programme will include a walk
 along the River Gipping.
 Day Money (includes lunch) £5
 If you require transport from Ipswich
 Station please contact the secretary.




1. En kiu urbo loĝas la plej unikaj homoj?
2. Kiu lando havas ses flankojn?



Solvoj malsupren

Antaŭ sepdek jaroj – “La nombro (25) de pagintaj membroj (*de E.Fed.; nur 17 en 1943- Red.*) ne estis tute kontentiga.” Kaj “Pro la vojaĝmalpermeso la konferenco en Chelmsford ne povis okazi”
Antaŭ dudek jaroj - OS majo 1994: Raporto de la jarkunveno en Kolĉestro inkluzivis la fakton ke ne nur 24 anoj ĉeestis, sed ankaŭ TV filmistoj kiuj filmis kelkajn membrojn
Antaŭ dek jaroj – majo 2004: Ni gastigis la Britan Kongreson en Felixstowe

FRED BASSET
 de **GRAHAM**



Solvoj:

Dakaro - tie la loĝantoj estas senegalaj!
 Kubo

Se vi jam ne pagis vian 2014 kotizon, bv. sendi ĝin (£4) tuj al

***Barrie Murphy
8 St. Clements Drive,
Leigh-On-Sea,
SS9 3BJ
Tel: (01702) 472193***

***kune kun via nuna adreso, retadreso kaj tlf.
numero – ni ne volas perdi vin!.
Multajn dankojn.***